2a JARO. N-ro 8. JULIO 1933.




JARKOTIZO AL SEL (enhavanta la jarabonon al Skolta Bulteno) :

| | |
|---|---|
| Skoltoj kaj skoltinoj (havanta pli ol 18 jaroj) | 2 ŝilingoj (anglaj) |
| Skoltoj kaj skoltinoj (havanta malpli ol 18 jaroj) | 1 ŝ 6 pencoj (anglaj) |
| Asociatoj kaj interesitaj personoj | 3 ŝilingoj (anglaj) |

Aparta jarabono al « Skolta Bulteno » 1 ŝilingo (angla), 6 frankoj (francaj), $ 0.25 (Usona) kaj proporcie por aliaj landoj.

Eldonita kvarfoje ĉiujare, laŭ garantio de la Centra Komitato de SEL.
*La venonta numero aperos ĉirkaŭ la 28-a de Septembro; manuskriptoj devos atingi la Redaktejon antaŭ la 1a de Septembro.*

---

**Redaktejo:** 54, Constable Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo.
Kasistejo (kien oni sendu kotizojn kaj abonojn) : 23, East Dulwich Grove, Londono, S. E. 22, Anglujo.

**Sekretariejo:** Netherton, Huddersfield, Yorks., Anglujo.

---

Scouting can never really succeed in its aims until a *simple* means of intercommunication for Scouts of all countries is found. It is to be found in the international language « Esperanto », and every Scout should learn and use this language so that he may be a real « brother to every other Scout », and « Be Prepared » to be of service to him.

Non è possibile allo Scoutismo raggiungere il suo scopo, senza un mezzo di comprensione internazionale. Perciô ogni Scout studi lo Esperanto se egli desidera veramente di essere il fratello di ogni altro Scout a qualunque paese appartenga ed essere pronto a renderglisi utile.

Il n'est pas possible au Scoutisme d'atteindre son but, sans moyen d'intercompréhension international. C'est pourquoi tout scout doit apprendre l'Esperanto, s'il désire vraiment être le frère de tout autre scout et être prêt à le servir.

## ĈE LA REDAKTORA SEĜO

### Eltrovemeco - la Jamboreo - Ni antaŭenmarŝos.

Kiam nia Ĉefulo, Lordo Baden Powell, estis sieĝigita de la Boeroj en Mafeking (Sud-Afriko), la Britoj estritaj de li havis nur kelkajn malgrandajn kanonojn sed la Boeroj havis multajn modernajn kanonojn. Sed li kaj liaj soldatoj ne restis kontentaj pri siaj malbonaj rimedoj, kvankam ili ne havis oportunon enporti pli bonajn kanonojn. Ili tuj komencis fabriki kanonon el la materialo havebla en la urbo, kaj fine konstruis kanonon novan el vaportubo forprenita de lokomotivo ĉirkaŭligita de feraj vergoj. Tiu kanono oni nomis « La lupo » kaj ĝi faris tre utilan servon al la defendantoj de la urbo, kaj ankaŭ samtempe multe mirigis la Boerojn. Tio estas vere skolta eltrovemeco.

Ĉe la nunjara Jamboreo, la skoltoj de la mondo ankaŭ devas montri « eltrovemecon ». La Skolta Movado estas bazita sur la fakto ke « Skolto estas frato al ĉiu al alia skolto », sed kiel ni povas esti veraj fratoj unu al la aliaj se ni eĉ ne povas interparoli kaj interŝanĝi niajn pensojn? Ni devas elserĉi rimedon. La rimedo ekzistas — estas Esperanto, lingvo facile lernebla, fleksebla, kaj belsona. Per la lernado de tiu lingvo mem, kaj la instigado al niaj skoltfratoj ke ili same faru, ni plenumos parton grandan de nia devo kiel skoltoj — ni montros nian eltrovemecon kaj iĝos veraj fratoj al ĉiuj. Nia Ĉefulo jam multfoje skribas ke ĉiu skolto penu akiri por si mem ankaŭ la nomon de « Amiketo de la tuta mondo ».

Kaj la Esperantistaj skoltoj ĉe la Jamboreo devas ankaŭ montri sian eltrovemecon. Ne ekzistas multe da financaj rimedoj por eldoni propagandilojn ĉe la Jamboreo; do necesas ke ni ankaŭ fabriku propagandilojn el la materialo ĉe niaj manoj. Kio estas tiu materialo? Estas niaj *voĉoj!* Ni proklamu, tiel eble plej multe, pri nia utila lingvo. Ni uzu ĝin. Ni kantu kantojn en Esperanto dum la Jamboreo, ni ĉeestu la Esperanto-kunvenon kaj instigu al niaj skoltfratoj ke ili ankaŭ ĉeestu (kaj tiam traduku por ili naclingven la paroladojn). Ni petu de la Hungara Skoltasocio Esperantistan gvidiston, kaj ĉiam kaj ĉie parolu en la lingvo, por ke la aliaj skoltoj aŭdu kaj vidu la *praktikan* utilecon de la lingvo por uzantoj. Vi trovos je alia paĝo de la Bulteno pluajn detalojn pri la Jamboreaj aranĝoj, studu ilin!

Nun miaj lastaj vortoj al vi kiel Portempa Redaktoro de nia Gazeto. La portempa redaktoro forlasos siajn laborojn, kaj daŭraj redaktoroj anstataŭos lin, kaj mi esperas ke nia afero simile atingos en la estonteco daŭran gravegan lokon en la skolta movado. Esperantistaj Skoltoj! PROFITU DE LA ESTINTECO — UZU LA NUNAJN TEMPOJN TIEL EBLE PLEJ EFIKE — ESTU PRETA POR LA ESTONTECO. — NI ANTŬENMARŜOS.

PORTEMPA REDAKTORO.

## ALDONAJ SCIIGOJ PRI LA JAMBOREO.

ALBUMO. — La Organiza Komitato eldonos Albumon, ilustritan per multaj fotoj. Havebla dum la lastaj tagoj de la Jamboreo. *(Ensendu fotojn pri Esperantistaj skoltaj aferoj.)*

HELPTENDARO. — La Hungara Skoltasocio preparas Helptendaron ĉe Mariabesnyo. Hungaraj kaj eksterlandaj skoltgrupoj povos ĉeesti, eĉ se ili nur restos dum kelkaj tagoj. Proponoj por tendar-lokoj devas esti aprobitaj de via

Nacia Skoltasocio. Menciu la nombron de la partoprenantoj kaj la tempodaŭron de via vizito. Kosto $ 0.55 po tage (inkluzive de manĝaĵoj, hejtoligno k.t.p.) Se vi provizos viajn proprajn manĝaĵojn kaj nur ricevos hejtolignon k.t.p. la kosto estas po 3 pengoj por la unua tago kaj 50 filler por ĉiu sekvanta tago. Ĉiu devas prepari siajn proprajn manĝaĵojn. Esperantistaj Skoltoj anoncu vin, ke vi loĝu kune!

JAMBOREA TENDARLIBRO estos ricevita de ĉiu partoprenanto de la Jamboreo post pago de la tendara kosto. Oni ankaŭ vendos ĝin aparte. (Skribu ke en ĝi aperu noto en kaj pri Esperanto!)

POLICISTOJ TENDARAJ. — La Hungaraj Roveroj agos kiel Policistoj. (Serĉu la esperantistajn policistojn.)

KONFERENCO. — La Sepa Internacia Konferenco okazos en la Halo de la Premonstrant Kanonika Ordeno ĉe Godollo je Aŭgusto 7a kaj 8a. (Ni esperas ke tie oni proponos pri Esperanto se estas sufiĉe da Esperanto-propagando dum la tendaro flanke de niaj membroj.)

INTERPRETISTOJ, estas haveblaj, laŭ peto, kaj renkontos sian fremdan taĉmenton ĉe la landlima stacio. Ili loĝos kun la fremda taĉmento kiun ili gvidas. *(Petu Esperantistan interpretiston por via Trupo.)*

PRESENTAĴOJ okazos ĉe Teatro, ĉe Tendarfajroj, aŭ ĉe la Sport-tereno aŭ ĉe Kunvenejo. Tie estos bona ŝanĉo por Esperantaj Kantoj, Ludoj, teatraĵoj, poemoj, k.t.p. UZU LA OPORTUNON. Ĉe la tendarfajroj en ĉiu el la 10 subtendaroj estos estrado kun elektra lumo kaj laŭtparoliloj. *Pretigu ion por SEL tendarfajro.*

FLAGOJ. — Oni petas la kunportadon de flagoj. NEPRE KUNPORTU ESPERANTISTAN FLAGON, por elpendigo kaj portado dum paradoj.

SKOLTINOJ. — La Hungara Skoltina Asocio preparas ricevi 400-500 skoltinojn. Por detaloj skribu al F-ino A. Lindenmayer, Verpeleti-ut 10, Budapest I, Hungarujo.

INFORMOFICEJOJ starigos ĉe Godollo fervoja stacio, kaj ĉe la enirejo de Subtendaro 7.

MUZIKO. — La Tendaro havos sian propran Radiostacion, kaj multaj laŭtparoliloj tra la Tendaro. Petu Esperantan programon, kaj anoncu en Esperanto.

ĴURNALO. — Estos por la Tendaro ilustrita ĵurnalo tage. Petu, ke enestu Esperanta parto.

## AVIZOJ OFICIALAJ

Francaj membroj bonvole notu ke la adreso donita en la Decembra Numero por nia Franca Agento estas nur *portempa.* Lia oficiala adreso por korespondado estas: S-ro Y. Tarabout,
Villa Gemmsy,
Sougères-sur-Sinotte (par Auxerre)
Yonne, Francujo.

---

Kelkaj membroj ne jam repagis siajn jarkotizojn. Ĉu *vi* estas unu el ili? Se jes, repagu tuj al la Kasisto.

---

Membroj bonvole notu ke la Statutaro de nia Ligo funkcios de la 1-a de Aŭgusto 1933.

La Kasisto de la Ligo volas esprimi la bedaŭron ke la Redaktora Krajono forigis sian tutan artikolon el tiu numero pro manko de loko. Tamen li atestos en la venonta numero pri Donacoj ricevitaj, kaj volas ankaŭ esprimi al la SEL-membroj ĉe Godollo siajn plej bonajn skoltsalutojn por sukcesa tendaro kaj propagando.

## LA ESPERANTA KUNVENEJO ĈE LA JAMBOREO

LA OFICIALA KUNVENEJO DE ESPERANTISTAJ SKOLTOJ ĈE LA JAMBOREO ESTAS ĈE LA HUNGARA TRUPO 199, *kio troviĝos ĉirkaŭ 200 metrojn for de la pordejo N-ro 1 de la Jamboreo, en la Subtendaro N-ro 1* (sud-okcidenta parto), se vi ne povas alie trovi ĝin demandu de la Policistoj en Subtendaro 1. Tuj post via atingo al la Jamboreo elserĉu tiun renkontejon!

Ĉiu Membro de SEL, kaj ĉiu esperantista skolto, ankaŭ devus viziti la oficejon de la Hungara Generala Kreditbanko (la oficiala Jamborea Banko) kaj tie vidu fraton Balkanyi (Hungara Agento de SEL). Frato Balkanyi deĵoras ĉe la Jamborea Banko, elserĉu lin tie, kaj anoncu al li kie vi estas trovebla, kiamaniere vi povas helpi pri Esperantaj aferoj; kun li priparolu pri la esperantistaj kunvenoj, tendarfajroj, k.t.p. Vi povas ĉe tiu Banko ŝanĝi vian monon, LA BANKO HAVAS ESPERANTO-SERVON — uzu ĝin, petu la Esperantan prospekton de la Banko kaj montru ĝin al aliaj! Estas bona propagando.

VI MEM POVAS PROPAGANDI PER:

*La ĉiama portado de la Insigno.* *Per ĉiama parolado en Esperanto.*

*Elserĉu aliajn Esperantistajn Skoltojn ĉe la Jamboreo* (vi trovos la landojn de kie ili elvenas en alia parto de tiu Numero).

*Efika propaganda estas: kolektu ofte kelkajn diverslandajn esperantistojn,* kaj kun ili travagu dum liberaj tempoj la Tendarojn, precipe vizitu lokojn kie troviĝos oficiale esperantistaj skoltoj (ĉe la fremdulgvidista tendaro — Hungara Trupo 199: ĉe policistaro skolta: ĉe la bankoficejo). *Estas grave,* ke tiuj lokoj ne vane akceptis esperantistojn.

*Vizitu la Esperantan kunvenon kaj tendarfajrojn. Kantu Esperantajn kantojn.*

*Al la ĉiutaga Tendara Gazeto sendu tekstojn* en Esperanto pri skoltaj kaj tendaraj aferoj. *Ĉe fotografadoj por la sonfilmo ĉeestu kaj parolu en Esperanto,* aŭ kune kantu en Esperanto se oni permesos.

*Portu Esperantistajn flagojn.*

La skoltoj eĉ rajtas *per radio paroli salutojn* dum certaj horoj. *Tion faru en Esperanto.*

*Proponu la prezenton en tendar-teatro* kaj ĉe tendarfajroj, Esperantajn scenojn.

*Ĉie unue parolu en Esperanto,* ke oni vidu ke la lingvo estas utila al vi kaj necesa por ĉiuj.

*Ĉie montru « Skolta Bulteno »,* kaj la aldonitan folieton.

ESTAS TRE GRAVE KE VI NEPRE PETU ESPERANTISTAN SKOLTGVIDISTON DUM EKSKURSOJ. — NE FORGESU!!

## Kie vi trovos esperantistajn skoltojn.

*Ĝis Junio anoncis sin:* Aŭstraj, Ĉeĥoslovakaj, Anglaj, Skotaj, Hispanaj, Hungaraj (ĉe Skolttrupo 199), Svedaj, Polaj, Germanaj, Latvaj, Francaj (spe-

ciale nia Franca Agento Y. Tarabout, Eclaireurs de France), Portugalaj (kelkaj Roveroj el Funchal, Madeira), Norvegaj (S-ro J. Berggreen, nia Agento, estros unu el la grupoj de norveganoj) kaj Trinidad (Brita Kolonio). Por pluaj detaloj demandu de frato Balkanyi! Eble estas aliaj Esperantistoj kiuj ne jam anoncis sin. Uzu nian lingvon por ĉiu okazo — vi neniam scias, ke la persono adresita de vi estas eble esperantisto, se ne vi eble varbos lin al nia movado.

PETU KOPIOJN DE LA KANTO SKOLTA « SKOLTARO TUTMONDA » DE FRATO BALKANYI (prezo Pengo 0,50)

## KRONIKO.

BELGUJO. — *Nova sukceso.* — La 3an de Junio, Kardinalo Van Roey (ĉefepiskopo de Malines), konsentis doni aŭdiencon al la belgaj esperantistoj. Tiuokaze, en la nomo de Baden Powell Belgian Scouts, nia Belga Agento S-ro J. Van Gulck faris paroladeton ĉe la Kardinalo pri la utileco de Esperanto por skoltoj en Jamboreoj k.t.p.. Malgranda delegacio de la skoltoj ĉeestis. Komencos kurso en la franclingva skolta revuo en Septembro. Belgaj skoltoj atendu ĝin. Jam regule aperas artikoloj ĉiumonataj en la skoltrevuoj pri Esperanto.

HUNGARUJO. — En la tria edono de la Jamborea Vortaro aperas Esperanta vortlisto. Tamen aperas aparte oficialaj eldonoj sen la Esperanta parto, kaj publike oni nur vendas la lastajn. *Kiam vi mendos kopion de la Vortaro nepre menciu, ke vi bezonas la Esperanto-tekston!*

*Szeged.* — En Skolta Rondo estis sukcesa ekspozicio pri skolta korespondado.

*Budapest.* — En la Skolta Rondo okazis lumbildparoladoj pri vojaĝo sur la Rejno de Frankfurt ĝis Köln, pri Romo, Brazilio, kaj Eger. Julio Baghy faris ankaŭ paroladon pri Nederlando, kaj Leipziga studento pri sia vojaĝo en Nord-Afriko. La Rondo aranĝis oficialan ekzamenon por skoltoj la 21an de Majo. Ĉeestis la ekzamenon, kiel reprezentanto de la Hungara Skoltasocio, Skoltoficiro Istvan Atanyi kiu diris varmajn dankvortojn pri la bona laboro. Ekzameniĝis 15 skoltoj. Ĉe fremdulgvidista ekzameno partoprenis 6 skoltoj kun sukceso. La Rondo kunvenas Lunde ĉe V., Nador utca 26.

*Gödöllo.* — Kelkaj skoltoj lernas Esperanton.

*Naskiĝo.* — Ni tre ĝojas ricevi la novaĵon pri la la naskiĝo de la dua fileto al nia estimata Hungara Agento, S-ro Paŭlo Balkanyi. Korajn gratulojn!

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Skoltoj en kelkaj urboj lernas Esperanton, kaj el Bratislava kelkaj membroj de la Ligo esperas ĉeesti la SEL-tendaron ĉe Godollo.

PORTUGALUJO. — En Funchal (Madeira) estas multe da intereso inter la skoltoj, kaj la Roveroj kiuj ĉeestos la Jamboreon lernis Esperanton.

HISPANUJO. — En Zaragoza, denove vekiĝas la intereso de la skoltoj pere de la agado de nia nova Hispana Agento. Kelkaj el la skoltoj komencas interkorespondadon kun aliaj landoj.

NORVEGUJO. — Ni tre gratulas al nia Norvega Agento (S-ro John Berggreen) pro sia elekto kiel Grupa Estro de Grupo de la Norvegaj Skoltoj ĉe la Jamboreo. S-ro Berggreen estas ankaŭ Esperanto-instruisto Ĉe-metoda, kaj gvidos kurson post la Jamboreo.

FRANCUJO. — Per artikoloj en la skoltgazetoj, nia Franca Agento vekis novan intereson pri nia afero.

En *Rouen*, nova kurso por skoltoj gvidata de S-ro R. A. Parrington, 6 rue du Loup, Rouen. Post la Jamboreo en Francujo ni atendas grandajn antaŭpaŝojn.

## SKOLTAJ LUDOJ.

NORVEGA. — Karavano starigas tendaron por la nokto. Ĉiuj valoraĵoj kolektitaj en bastonio, ĉar estas rabistoj proksime. La karavananoj lokiĝas ĉirkaŭ la tendaro por malhelpi al la rabistoj. Tamen la rabistoj provas forŝteli la valoraĵojn.

Sur teritorio limigita, oni metas paperetojn nombre 10-12, farante ke ili estu facile videblaj. La karavanuloj lokiĝas ekzemple 100 metrojn for de la tendaro, en cirklo. La rabistoj ŝteliras en tendaron por preni papereton (valoraĵon) kaj poste ŝteliros reen kun ĝi. Kiam karavanulo vidas rabiston li ĉasas lin: sed karavanulo ne povas sekvi rabiston sur teritorio limigita. Kiam rabisto estos kaptata li ne povas daŭrigi la ludon, sed estas « morta ». Kiam la rabistoj estas en la cirklo, ili estas provizore savitaj. Kun unu prenita papero la rabisto provos forŝteli kun ĝi al la rabista groto. La karavanuloj povos denove ĉasi lin. Se li estas kaptata kun la papereto, li devas doni ĝin al la karavanulo kaj forlasas la ludon: aŭ li povas forĵeti ĝin, sed devas ankaŭ forlasi la ludon, tiam la karavanulo devas trovi la papereton por gajni poentojn.

Kiam la tempo destinita por la ludo estas elfluita, ĉiuj kunveniĝas ĉe la gvidanto kiu kalkulas. Ĉiu papereto portita al la rabista groto ricevas 10 poentojn, ĉiu reprenita papereto ricevas 8 poentojn por la karavanuloj, ĉiu rabisto kiu ĉe la fino de la ludo troviĝas en la karavana cirklo kun papereto, ricevas 2 poentojn. Neniu povas forpreni pli ol unu papereto el la cirklo, sed se li trovas papereton ĵetitan, li povas kunpreni ĝin.

*(Tradukis J. Berggreen.)*

ANGLA. — La skoltoj staras en du vicoj (inter kiuj estas unu metra distanco), rigardante unu al alian. La vicoj nomiĝas unu « fiŝoj » kaj la alia « bestoj ». Je egala distanco malantaŭe ĉiu vico troviĝas ĝia « hejmo » (arbo, muro). La ludestro krias la nomon de ia fiŝo aŭ ia besto. Se li elektas fiŝon, la « fiŝoj » returniĝas kaj ekkuras al sia hejmo, sed sekvas ilin la « bestoj » kiuj penas kapti « fiŝojn » per tuŝo. Se la nomo kriita estas tiu de bestoj la « fiŝoj » ĉasas la « bestojn ». Ĉiu kapito signifas unu poenton al la vico de la kaptinto.

*(Tradukis F. Douglas Murphy.)*

## SKOLTISMO EN PAPUA.

En Papua la Skolta Movado inter blankaj knaboj estas komplikita iom per la fakto, ke la knaboj antaŭ ol ili atingas la skoltan aĝon foriras por edukado alilanden. Do la ambicia Skoltestro devas kontentiĝi enigi en siaj lupidoj sufiĉan preparadan instruon por ebligi al ili stari kun samaĝaj knaboj en aliaj lokoj.

Nuntempe ekzistas trupo de Lupidoj nur en Port Moresby, kaj la plej alta numero neniam superas dekkvin, se ni ne enkalkulas la malgrandajn fratinojn kiuj kviete rigardas la knabojn dum instruado aŭ ludado. Ankoraŭ eŭropaj Lupidinoj aŭ Skoltinoj ne ekzistas en Papuo, sed S-ino Chatterton faras valoran

laboron ĉe trupo de indiĝenaj skoltinoj apud Port Moresby. Mi kredas, ke la skoltinoj de Papuo povus surprizi siajn blankajn fratinojn. Sub la kapabla ĉefeco de la Skoltestro, S-ro P. Chatterton, lernejestro de la Poreporema Misia Stacio, la skolta movado sukcesas inter la indiĝenoj, niaj brunhaŭtaj fratoj. La Misia Stacio estas lokita ĉirkaŭ du mejlojn laŭlonge de la marbordo de Port Moresby, apud la plej granda vilaĝo en Papuo (loĝantaro de pli ol du mil personoj).

Estas el tiu vilaĝo ke la skoltoj kaj roverskoltoj de S-ro Chatterton venas, kaj dum la mallonga tempo de miaj rilatoj kun la skoltoj de Papuo mi estas notinta progresajn ŝanĝojn ĉefe pri uniformoj. Kiam mi alvenis al Papuo antaŭ tri jaroj, la konstanta uniformo portita de ĉiuj membroj, escepte la Skoltestro, konsistis el peco de talo bindita simple al jupo, kaj al la plej malalta angulo de kio la nomrubriko « 1-a Papua » estis kudrita.

Simile al aliaj bonaj skoltoj ili trapasis siajn provojn kaj gajnis insignojn pri kompetenco, kaj portis ilin sur la brakoj laŭ la reguloj, *sed tatuitajn!*

Je tiu tempo la administrantaro deziris, ke la skoltoj konservu ilian ideon pri la skolta uniformo, sed la skolta gvidlibro informis la skoltojn pri la Brita uniformo, kaj tio kion diras la Gvidlibro estas ila gvido en ĉio. La kutimo ŝangiĝas rapide, kaj nun la konstanta brita ideo pri uniformo aperas, kompleta de knaraj botoj kaj ĉapelo sufiĉe granda enhavi plu da harojn ol kapon.

*(Tradukis D-ro F. J. Williams.)*

## SEKRETARIA ANGULO

Salutojn, geskoltfratoj de la mondo. Nia Ligo kreskas rapide, novaj membroj aliĝas el multaj landoj — sed ankoraŭ estas miloj da skoltoj kiuj scias malmulton pri Esperanto.

Ĉe Godollo oni aŭskultos al multaj lingvoj, kaj oni vidos knabojn el diversaj landoj kunparolante kun malfacileco pro lingva barilo. Mi petas vin ĉiujn elserĉu la aliajn SEL-anojn kaj aliajn Esperantistajn skoltojn. Vi certe trovos kelkajn kiuj ne aliĝis al nia Ligo. Bonvole donu al ili la folieton pri ni, aŭ mian adreson. Kolektu iliajn adresojn kaj sendu al mi por ke ni varbu ilin en nia Ligo.

Ni volas per nia Ligo amikigi ĉiujn skoltojn, kaj anstataŭ 800 membroj ni bezonas 800.000. Tiam ni certe povus influi la naciajn estrojn. Ni pli vigle ĉiuj laboru.

Dum la Jamboreo apartigu la tagon de la SEL Kunveno por pridiskuti Ligajn aferojn. Unu grava afero estas « Kie ni tendaros venontan jaron? ». Estu preta por tiu demando. Nur en lando kie ekzistas sufiĉaj membroj por organizi tian tendaron estos permesata. Kiu havos la honoron gastigi nin dum 1934?

Pro granda kaj grava laboro lastatempe ne estis eble por mi respondi ĉiujn miajn korespondantojn — sed baldaŭ mi esparas respondi al ĉiu kiu skribis al mi. Bonvolu havu paciencon. NORMAN BOOTH, Hon. Ĝen. Sekretario.

**GRAVA. — La kunveno de la Skolta Esperantista Ligo okazos ĉe la 199-a Hungara Skolttrupo (Subtendaro 1) je Vendredo 4an de Aŭgusto je la 10a horo matene. Nepre ĉeestu la kunvenon.**

# VOLAS KORESPONDI

Trupestro W. G. Kelleway, 41 Harley Terrace, Gosforth, Anglujo, *kun tuta mondo.*

F-ino F. Hall, 74a Boarshaw Road, Middleton, Manchester, Anglujo, *kun Roverinoj aŭ Trupestrinoj tra la tuta mondo.*

S-ro Stefano Csombai, Hattyu u. 30, Szeged, Hungarujo, *kun geskoltoj en* Anglujo, Aŭstralio kaj Sud-Ameriko.

S-ro Manuel Gargallo, Mayor 90, Zaragoza, Hispanujo, *kun skoltino en Aŭstralio.*

S-ro Teodoro Tomas, Ponzano 6, Zaragoza, Hispanujo, *kun skoltinoj el la tuta mondo en Esperanta kaj franca lingvoj.*

S-ro Elias Sanchez, Augustin 2 y 4, Zaragoza, Hispanujo, *kun geskoltoj en Litovujo, Grekujo. Pollando, Hindujo, kaj Siam-lando.*

S-ro Tomas Tomas, Ponzano 6, Zaragoza, Hispanujo, *kun skoltinoj en Congo Belga, Aŭstralio kaj Azio.*

S-ro Domingo Berdejo, Barrio del Castillo 117-2°, Callejon de Piazuelo, Zaragoza, Hispanujo, *kun geskoltoj el Belgujo, Anglujo kaj Hungarujo.*

S-ro Ferdinando Castellon, Paseo Sasera 10, Zaragoza, Hispanujo, *kun skoltinoj el Parizo kaj Vieno.*

S-ro A. Pedro Marqueta, Santa Ines 4, Zaragoza, Hispanujo, *kun geskoltoj el Finlando, Polujo, Hungarujo, kaj Orientaj landoj.*

S-ro Paulino Turbica, Exploradores de Zaragoza, Facultad de Medicina bajos, Zaragoza, Hispanujo, *kun geskoltoj el Orientaj kaj Nordaj landoj.*

---

Sans la langue internationale Esperanto les Scouts sont des muets au Jamboree. L'Esperanto apporte la seule vraie solution à la question d'échange internationale fructueuse entre Scouts du monde entier.

The Scout Brotherhood need a language so that its members can understand one another. That's where Esperanto comes in!

Wenn jeder Pfadfinder Esperanto spräche, wäre das Jamboree eine wirklich internationale Zusammenkunft und bestände nicht aus nationalen Zeltlagern an demselben Ort, begrenzt durch sprachliche Mauern.

Senza l'Esperanto, gli Scouts saranno muti durante lo Jamboree. La famiglia scout ha bisogno di una lingua perche i suoi membri possano fraternizzare: ecco l'Esperanto!

No es posible al Escultismo conseguir sus fines provechosamente, sin un instrumento de comprensión internacional. Por eso todo eplorador debe aprender Esperanto, si verdaderamente desea ser hermano de todo explorador de otro pais, y estar dispuesto a servirle.